# TELOPEO

Oficiala Organo de La Esperanto-Federacio de Nova Sud-Kimrujo

*Volumo 58, Numero 07, julio 2023*

**Esperanto Domo, 143 Lawson St, Redfern, Sydney NSW 2016, Aŭstralio**
**Redaktoro: Dmitry Luŝnikov, Provleganto: Nicole Else**


## Estrarkunveno de EFNSK

*Nicole Else, sekretario de EFNSK*

La 2an de julio ni havis estrarkunsidon. Jen kelkaj eroj kiujn ni pridiskutis.

- Ni daŭrigos enketi pri la kostoj ripari la tegmenton de la ateliero.
- Ni aĉetis novajn litojn por la gastĉambro.
- Ni daŭrigos enketi pri sunpaneloj por Esperanto-domo.
- Nia jarkunveno okazos la 3an de septembro je la 10a horo.

## Anonco:
## Laborsesio kaj ĉeesta kunveno ĉe Esperanto-Domo

*Jonathan Cooper, prezidanto de EFNSK*

**Dimanĉon, la 6an de aŭgusto**, je **10:00**, okazos la unua aferkunveno de Esperanto NSW en Esperanto-Domo post la komenco de kronvirusa pandemio. Kvankam ĝi estos ĉefe estrarkunveno, ĉiuj membroj estas bonvenaj.
(Se vi volos partopreni, sed ne povos ĉeesti fizike, ankoraŭ estos servo per Zoom. La ligilo ŝanĝiĝis, do mesaĝu nsw@esperanto.org.au por peti la novajn detalojn.)
Poste, estos komuna tagmanĝo. Manĝaĵoj kaj trinkaĵoj estos provizataj, sed vi bonvenas ankaŭ kunporti iujn por dividi, se vi deziras.
Posttagmeze, okazos laborsesio (angle "working bee"), por ordigi kaj purigi Esperanto-Domon, ĉefe la teretaĝon. Ekzistas multaj aĵoj – en skatoloj kaj dosierujoj – kiuj verŝajne ne estas bezonataj. Kaj ankaŭ tiuj, kiuj devus esti en la arkivo. Bonvolu helpi nin decidi. Vi eble malkovros interesajn faktojn pri la loka Esperanto-movado!



## Artikoloj de "PULP"


*Dmitry Lushnikov, direktoro de EFNSK*

Mi kelkfoje skribis pri studentoj de Sidneja Universitato kiuj publikigas studentan ĵurnalon "PULP". Ili vizitis Esperanto Domon en novembro-decembro 2022 kaj februaro 2023. Ankaŭ ili invitis min partopreni unujaran naskiĝfeston de la ĵurnalo kiu okazis en majo 2023. Poste ni diskutis ideon traduki kelkajn artikolojn de "PULP" en Esperanton.
Nun mi prezentas la unuan artikolon "Mi vizitis Esperanto-Domon: Nun mi konas mondan pacon" de **Ariana Haghighi.** Traduko de **Jonathan Cooper.**

## Mi vizitis Esperanto-Domon: Nun mi konas mondan pacon

November 16, 2022 - Ariana Haghighi

*Ĉefsidejo, loĝejo, kaj muzeo kaŝas sin modeste sur la Redfern strato. Vestitaj en kamuflaĵo, ili ne videblas de la okuloj de studentoj rapidantaj al strato Abercrombie.*




Studentoj kies piedoj iris preter ĝi dum jaroj ne konscias pri ĝia nevidebla ĉeesto ĉe 143 Strato Lawson. La modesta brika fronto kaj subokulnivela ŝtala signo malhelpas vidi la komplikan miton florantan ene de ĝiaj muroj.

“Ĉu vi aŭdis pri la Esperanto-Domo?”, mi demandas miajn amikojn, marŝante flanke kiel krabo por ke estu spaco por 4 personoj sur la trotuaro de Strato Lawson.

Kuntiritaj brovoj. Skuitaj kapoj.

Pro iu mistika koincido, ni atingas la dunivelan institucion sekundojn poste.

Multaj voĉoj eldiras: “Mi neniam rimarkis ĝin”.

*******

Post kiam oni estas atentigita pri la ekzisto de la Esperanto-Domo, kiel mi estis en mia unua studjaro, ĝi postulas atentan rigardon ĉiufoje kiam oni poste preterpasas ĝin. Post multaj fojoj de pasiva scivolemo, mi decidis, ke mi devus finfine viziti ĝian internon.

Malsekigita pro merkreda posttagmeza pluvego, mi elpremis la franĝojn de mia drelika jako ĉe la enirpordego. Miaj piedoj ritme frotiĝis sur la pordotapiŝon, forpuŝante la foliojn inter la krestoj de la plandumo.

Mi paŝis en magian mondon por lingvisto, kie brilis la kremkoloraj muroj. La senmakulaj surfacoj estis ornamitaj per flagverdaj afiŝoj reklamante la historion de Esperanto, antaŭulojn kaj ĉefajn lingvajn elementojn. Dekstre kuŝis amaso da belaj revuoj Monato, ĉiumonata Esperanta eldonaĵo presita en Belgio.

Dmitry Lushnikov, estrarano de Esperanto NSW, bonvenigis min malgraŭ mia spontanea merkreda eniro. Li unue demandis min ĉu mi scias multon pri Esperanto — homfarita, baza lingvo celanta disvastigi mondan pacon. La kreinto Ludoviko Lazaro Zamenhof elpensis kaj la lingvokonstruon kaj akompanan socian movadon, dum li klopodis krei harmonion per kreado de facile lernebla dua lingvo. Zamenhof estis revanto, lia korpo lamante malantaŭ la fortaj pasioj de lia menso. Pionira noviganto, li disdonis donacojn de pra-Esperanta vortaro dum sia 19-a naskiĝtaga festo.

Li estas eternigita per statueto, kiu salutas vizitantojn, sur la antaŭa skribotablo. Ni poste serpentumis tra ĉambroj plenplenaj de verdaj aĵoj. Malantaŭ la antaŭĉambro estas komforta instruejo kun blanktabuloj — Lushnikov klarigis, ke ili tie okazigas klasojn de ĉiuj niveloj.

Malantaŭ la klasĉambro kaŝiĝis pli surpriza vidaĵo. Lushnikov malfermis la pordon por malkaŝi bazan tamen allogan gastĉambron. Por la sperta esperantista vojaĝanto, tio ne estas surpriza — en ĉiuj Esperanto-Domoj tutmonde, lingvoparolantoj povas tranokti tie dum du semajnoj maksimume, senkoste. La sola prezo estas scipovo de, kaj pasio por, Esperanto — aligu min por tiu netradicia somera subluo! Lushnikov diris al mi ke, kiel oni imagus, la lito kolektis polvon dum la pinto de KOVIM-19, sed la gastĉambro nun estas vizitata de fluo de interŝtataj kaj internaciaj turistoj. Tipe, oni atendas, ke vizitanto estu Esperanto-parolanto, aŭ studu Esperanton unu horon tage dum la daŭro de la restado. Tamen, tiu devigo estis nuligita por du ukrainoj en septembro 2022, "ĉar ili spertis multajn malfacilaĵojn dum la milito en Ukrainio."

Ni supreniris la ŝtuparon de la ĉefkonstruaĵo kaj Lushnikov malkaŝis planetarion de mirindaĵoj; ŝaktabuloj sidis rekte kiel sunoj en la mezo de la ĉambro, kaj ni ĉirkaŭiris ilin. Mi eksciis, ke la Domo ankaŭ estas hejmo de ŝakklubo... merkredvespere. Se prozo pli allogas vin ol logiko, la merkreda vespera libroklubo eble estos pli taŭga elekto por vi. Malsataj lingvolernantoj ankaŭ povas ĉeesti vesperojn de gastronomia ĝojo, kiel ekzemple "Bagel-vespero".

Multaj povus demandi kial la estraro pretas provizi tiajn agrablaĵojn kaj agadojn por malgranda aŭ neniu kosto. Por la fervora esperantisto, lerni la lingvon estas pli ol regi gramatikajn regulojn. Esperanto ampleksas interkulturan interŝanĝon kaj komunikadon; Lushnikov diris al mi, "Tiuj rimedoj estas ofertataj senpage ĉar ni kredas ke Esperanto, kiel ĉiu lingvo, estas nur same forta kiel ĝia komunumo de parolantoj, kaj ke ne estu baro por iu kun sincera deziro lerni ĝin."

Ekscitige, Esperanto-Domo eble havos renovigojn en la nova jaro. Lushnikov malkaŝis la planojn de la estraro konstrui kafejon alfrontantan preterpasantojn, vendante kafon al dormemaj studentoj. Dum la jarkunveno, la estraro diskutis aliajn ideojn por reklami Esperanton, ekzemple aĉeti terpecon kaj konstrui 'Esperanto-vilaĝon', aŭ lupreni loĝaŭton kaj ornami ĝin Esperant-stile.

Ne subtenataj de longdaŭraj institucioj, apogantoj de Esperanto spertas iujn malfacilaĵojn pri financado por diskonigi la kulturon — kiel Lushnikov diris, "Multaj naciaj registaroj finance subtenas siajn proprajn naciajn lingvojn. Tamen, ĉar Esperanto estas lingvo kiu apartenas al neniu (aŭ pli ĝuste, al ĉiuj), neprofitcelaj organizaĵoj kiel la nia devas 'plenigi la mankon'."

Esperanto renkontis multajn kritikojn, kiuj malhelpis ĝian uzadon de pli multnombra loĝantaro, kiel ĝia eŭropcentra lingva karaktero. Konante ĝiajn mankojn, sed pli kredante pri ĝiaj avantaĝoj, Esperanto-Domo flegas la esperon, ke la populareco de la lingvo kreskos. Nuntempaj esperantistoj estas plenigitaj de sopiro, neniam forgesante Zamenhofon kaj lian revon pri pli bona mondo.

EFNSW: Esperanto Domo, Unua Dimanĉo de la monato estrarkunsido 09:00 ĝis 11:00
Kontaktu Jonathan Cooper 0403 358 941

Manlia Esperanta Klubo ĉe la oceana fronto kontraŭ la Restoracio Bluewater, Suda Stejno
1a kaj 3a Sabatoj; 10:00 atm; Komencantoj Bonvenaj
Kontaktu Roger (02) 9976 6320 *manly@esperanto.org.au*

La Meza Marborda Grupo; 3a Dimanĉo de la monato; kontaktu Joanne (02) 4362 8287
Novkastelanoj: Kontaktu Andrew (02) 4951 2084 *newcastle@esperanto.org.au*

La Suda Marborda Grupo; malgranda grupo kunvenas foje je Bega.
Komencantoj Bonvenaj. Penny Vos (02) 6495 2922

La Esperanto Federacio de Nova Sud-Kimrujo:
Esperanto Domo,
143 Lawson St, Redfern 2016 (02) 9319 4775;
Malfermata ĉiun merkredon, 10:00 – 20:00
*(Sonigu elektran zumilon ĉe la strato)*
www.instagram.com/esperanto_nsw/
www.facebook.com/EsperantoNSW/
www.EsperantoHouse.org.au
retadreso: *nsw@esperanto.org.au*




| | |
|---|---|
| Prezidanto: | Jonathan Cooper |
| Vic-prezidanto: | Andrew Spannenberg |
| Sekretario: | Nicole Else |
| Kasisto: | Alan Turvey |
| Estrarano: | Chris Betcher, Adam Levy, Dmitry Luŝnikov |